

# PROGRAMA

## 67 Hispana Kongreso de Esperanto

Kuenko, 3-6 Julio 2008



FEDERACION  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO



DIPLUTACIÓN PROVINCIAL DE CUENCA



Fundación de Estudios  
Ciudad de Cuenca



Obra Social



Ayuntamiento de Cuenca



Junta de Comunidades de  
Castilla-La Mancha

# 67 Hispana Kongreso de Esperanto


Kuenko, 3-6 Julio 2008

## Enhavtabelo

Salutmesaĝoj:

Probal Dasgupta, prezidanto de UEA	...2
Augusto Casquero, prezidanto de HEF	...3
Francisco Javier Pulido, Urbestro de Kuenko	...4
Kuenko	...6
La Kongresejo	...7
Kiel moviĝi, utilaj adresoj, kion fari	...9
Mapo de Kuenko	...9
Programo	...10
Kelkaj Partoprenantoj kaj Partoprenoj	..14
Kongresanoj	..23

# Salutmesaĝo de Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA



Estimataj samideanoj,

Mi ghojas audi, ke okazos de la 3a ghis la 6a julio 2008, en la historia urbo Cuenca, la 67a Hispana Kongreso de Esperanto.


En mia propra nomo kaj en tiu de Universala Esperanto-Asocio, mi kun granda plezuro salutas la kongreson de unu el niaj plej gravaj landaj movadoj.

Ne nur la enlanda plurlingveco en la hispana ŝtato, sed ankaŭ la internacia graveco de la hispana lingvo igas vian movadon aparte grava areno por la preciza formulado kaj la laupova traktado de demandoj, kiujn la esperantista movado devas aparte enfokusigi. Mi ghojas rimarki, ke la perspektivo bazita sur homaj rajtoj alportas grandan rikolton el Hispanio kaj el la hispanlingvaj regionoj. Kiam en nia movado ni parolas pri specifa nacia lingvo kun internacia disvastigo, ni multe pli ofte okupighas pri la angla kaj la franca, ol pri ekzemple la hispana. Sed ni scias, ke kreskas la hispanlingvaj fortoj ene de Usono mem, kaj ke la internacia stato de la prilingva konscio de la hispanlingvanaro grave efikos sur chies estontecon, ne nur en Esperantujo.

Mi kompreneble atendos audi, pri kio vi chefe okupighis dum la chi-jara kongreso. Ghis revido kun iuj el vi dum la UK, amike salutas

Probal

# Salutmesaĝo de Augusto Casquero, Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio



## **KARAJ GEKONGRESANOJ:**

Unuafoje en la historio, HEF kongresos en la belega kaj historia urbo Kuenko, centre de Hispanio, proksime de grandaj urboj kiel Madrido, Zaragozo kaj Valencio. Dank'al entuziasma laboro de nia membraro, kaj ĉefe dank'al la entuziasmo de nia samideano Alejandro Pareja, ni havos la eblecon ĝui la belecojn, tradiciojn, gastronomion, de ĉi tiu bela kaj interesa urbo.

Kiel sciante, Kuenko estis nomumita "Monda Kultura Heredaĵo" de UNESCO. La tuta urbo. La kialo estas ke la tuta urbo, same kiel la ĉirkaŭaĵoj, estas plena je belaj, historiaj, interesaj lokoj, tre bone zorgitaj, kiuj vekas la atenton de homoj el la tuta mondo.

Do, ni havos la plezuron konatiĝi kun tiu beleco, kaj en agrabla etoso ĝui la interesan programon, preparita de la LKK. La kongresa temo estas: "Lingvoj, trezoro de la homaro, iloj por dialogo" . Temo ŝatata de la esperantistoj, kiuj konscias pri la graveco de la lingvoj, kaj de ties konservado.

Por HEF ĉi tiu kongreso estos speciale grava, ĉar dum ĝi okazos renovigo de la Estraro. Estas bonvenaj ĉiuj sinproponoj por kandidatiĝi por la diversaj postenoj kaj taskoj de HEF. Ĉies helpo ankaŭ estos tre bonvenaj. Kaj certe ankaŭ tiuj kiuj ne kandidatiĝos estos pretaj helpi, kiel ĉiam ĝis nun okazis.

Ĝuu la kongreson, konatiĝu kun la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, ne maltrafu la diversajn interesajn programerojn, profitu la okazon por perfektigi vian nivelon de Esperanto. Ĉiam helpu la LKK-n, kiu sindone laboros por ni ĉiuj, por ke ni plezure ĉeestu gin.

Mi deziras speciale kaj varme danki kaj gratuli la LKK-n, la lokajn instancojn, sen kiuj tute ne eblus la sukceso de nia kongreso, kaj ĉiujn kiujn kunlaboris en la organizado, kaj ankaŭ tiujn kiujn surloke helpos.

Havu agrablan kaj samideanan restadon en Kuenko.

**Augusto Casquero**

**Prezidanto de HEF**

## Salutmesaĝo de la Urbestro de Kuenko



Es un honor para mí que Cuenca se convierta por unos días en la capital del Esperanto de nuestro país, y sea anfitriona de un evento tan importante como es el 67 Congreso Español de Esperanto.

*Estas honore por mi ke la urbo Kuenko fariĝos dum kelkaj tagoj ĉefurbo de Esperanto en nia lando kaj gastos tiel gravan eventon kiel la 67a Hispana Kongreso de Esperanto.*

Es nuestro deseo acoger a todos cuantos se acerquen hasta aquí con motivo de esta celebración y brindarles nuestra hospitalidad más sincera a quienes defienden y difunden el esperanto como herramienta neutral de comunicación entre personas de diferentes lenguas.

*Ni deziras ricevi ĉiujn kiuj venos ĉi tien okaze de tiu solenaĵo kaj proponi nian plej sinceran gastemon al tiuj, kiuj defendas kaj diskonigas Esperanton kiel neŭtralan ilon por la komunikado inter homoj el diversaj lingvoj.*

Los conquenses sabremos estar a la altura de un evento de esta relevancia y ser los mejores anfitriones para invitados venidos de todas partes de la geografía española y extranjera.

*Ni, kuenkanoj, scios agi laŭ la postuloj de tiel grava evento kaj esti la plej bonaj gastigantoj por gastoj kiuj venotaj el ĉiu Hispanio kaj eksterlando.*

Quiero desear a todos los participantes que aprovechen su estancia en nuestra ciudad para disfrutar con sus hermosos parajes, que hacen de esta Ciudad Patrimonio de la Humanidad un lugar de singular belleza e interés, y que gracias a sus importante valores artísticos y culturales, se ha convertido en una seria candidata a ostentar el título de Capital Cultural Europea en 2016.

*Mi deziras rekomendi al ĉiuj partoprenantoj ke ili profitu sian restadon en nia urbo por ĝui ĝian belajn vidindaĵojn, dank' al kiuj ĉi tiu urbo, Monda Kulturheredaĵo de UNESKO, estas aparte bela kaj interesa loko, kaj ĝiajn gravajn artajn kaj kulturajn posedaĵojn, kiuj faras ĝin konsiderinda kandidato al la titolo de Eŭropa Kultura Ĉefurbo en la jaro 2016.*

Por último, mostrar mi agradecimiento a la organización que ha querido que Cuenca sea la sede de este importante congreso.

*Fine mi volas esprimi mian dankon al la organizantoj kiuj elektis Kuenkon kiel sidejon de ĉi tiu grava Kongreso.*

FRANCISCO JAVIER PULIDO

ALCALDE PRESIDENTE DEL AYUNTAMIENTO DE CUENCA



AYUNTAMIENTO DE CUENCA

# Kuenko (Cuenca)



La urbo Kuenko, hispane Cuenca, staras 150 km sudoriente el Madrido kaj ĝi estas ĉefurbo de la samnoma provinco. La provinco Kuenko estas la 5a plej granda en Hispanio laŭ surfaco, tamen ĝi estas la 7a malplej popolata. Kaj la urbo mem havas nur 50,000 loĝantoj kaj ĝi estas la dua plej malgranda provinca ĉefurbo en Hispanio, post Teruel. Ĝi do estas trankvila urbeto meze de apenaŭ loĝata regiono, kaj ĉirkaŭata ĉefe de montaroj kaj pinarbaroj. La urbo staras je 956 m. super la mar-nivelo. La vetero estas malvarma dum la vintro, ofte neĝas kaj la temperaturoj ofte atingas -5 aŭ eĉ -10 gradojn. Dum la somero la vetero estas seka kaj varma, sed dank' al la altitudo la temperaturo neniam estas tiom alta kiel en aliaj hispanaj urboj, ĝi ofte estas ĉirkaŭ 33 gradoj maksimume.

La urbo estis fondita de la islamanoj ĉirkaŭ la 10a jarcento sur ege strategia situo, sur kruta monto inter la riveroj Júcar kaj Huécar. Ĝi estis konkerita de la kristana reĝo Alfonso la 8a en la jaro 1177. Post tiam, eble la plej interesa epoko de la historio de Kuenko estis inter 1950 kaj 1980 kiam ĝi populariĝis inter artistoj, pentristoj, filmistoj ktp, multaj el kiuj loĝis en Kuenko almenaŭ parton de la jaro. El tiu epoko devenas unu el la plej interesaj vizitindaĵoj de la urbo, la Museo de Arte Abstracto Español (Muzeo de Hispana Abstrakta Arto), fondita de Fernando Zobel, kiu estis vera instiganto de tiu populariĝo de la urbo.

La urbo dividiĝas en du partoj; la malnova urbo, kiu staras, kiel dirite, sur monto inter du ravinoj, hispane "hoces", laŭ kiuj fluas la riveroj Huécar kaj Júcar, estis nomata Monda Heredaĵo de UNESKO en 1996 kaŭze de la bonega konservado de la antikva urba pejzaĝo kaj la mezepoka fortreso, ĝia

riĉa civila kaj religia arkitekturo de la 12a ĝis la 18a jarcento, kaj la eksterordinara fuzio de la urbo kun ties belega natura medio.

La plej interesaj festivaloj en Kuenko estas la Semana Santa (Sankta Semajno), la Semana de Música Religiosa (Semajno de Religia Muziko), kaj la festoj de Sankta Julián (en la monato aŭgusto) kaj de Sankta Mateo (septembro).

## La Kongresejo



La kongresejo estas la Centro Cultural Aguirre, en la centra parto de la malsupra urbo, tuj antaŭ la grandioza konstruaĵo kaj ĝardeno de la *Diputación Provincial*. La konstruaĵo estis konstruita en la 19a jarcento kiel *Escuelas Aguirre*, pedagogia institucio kreita de la krausista mecenato Lucas Aguirre y Juárez.

Nuntempe ĝi enhavas aŭlon, publikan bibliotekon, studĉambrojn kaj ekspoziciejon.



## **Kiel moviĝi – Urbaj busoj kaj taksioj**

En Kuenko ekzistas urbaj busoj, tamen ili estas relative neoftaj. Taksioj estas malmultekostaj kaj la taksi-haltejo estas tuj apud la kongresejo. La buso kostas po 0,75 €. Taksio el la kongresejo ĝis la Universitata restadejo koston maksimume 4 €. Jen la ĉefaj bus-linioj:

Por viziti la malnovan (supran) urbon: linio 1

Bus- kaj trajnstacio al Kongresejo: linioj 1, 3, 4, 6, 7, 8

Kongresejo al Universitata restadejo kaj male: linioj 3, 4, 5, 6, 7, 8

## **Kuenko, Utilaj Adresoj kaj telefonnumeroj**

Radio-taxi Cuenca 969 233 343

Loka polico 092

Nacia polico 091

Turisma oficejo 969 241051

Centro Cultural Aguirre 969 240403

Universitata Restadejo "Bartolomé Cossío" 969 240870

## **Kuenko, kion fari**

Dum la kongreso oni povos viziti:

**3an de julio, Teatro Auditorio de Cuenca, 20:30h**


"Mujer busca hombre que aún no existe", de Eloy Arenas (teatraĵo)

**4an de julio, Plaza de la Merced, 21:00h**

Senpaga plenaera koncerto de "Joven Orquesta de Cuenca"

**Dum la tuta semajno, Parque de San Julián (tuj malantaŭ la kongresejo):** Semana del Vino y de la Tapa

# Mapo de Kuenko, ĉirkaŭaĵoj de la kongresejo



K : Kongresejo

B : Bushaltejo (por veturi al la Universitata restadejo)

T : Taksi-haltejo

# Programo

## **3an de Julio (ĵaŭdo)**

10:30 Akcepto de la kongresanoj

12:00-13:00 Kion fari? (Prezentado de eventualaj projektoj  
gvidata de Miguel Gutiérrez)

14:00-15:15 Manĝotempo

15:30-17:00 Ludotempo

17:00-18:00

1) Baza kurso de Esperanto (Pedro Hernández)

2) Ateliero pri poezio (Jorge Camacho)

18:00-19:00 100-jariĝo de Frateco (Lorenzo Noguero)

19:00-20:00 Interkona vespero

Nekuiritaj manĝaĵoj (Beate Schneider)

20:15-21:30 Vespermanĝo

## Programo

**4an de julio** (vendredo)

07:30-09:30 Matenmanĝo

09:30-10:30 Prezentado de Beletro Almanako kaj de la lastaj  
Libroj de IEM

10:30-11:30 Malfermo de la Kongreso

11:30-12:30 Lingvoj, trezoroj de la homaro, ilo por dialogo  
(Toño del Barrio)

12:30-13:30 La azia drako: vivo, kulturo, movado (Augusto  
Casquero)

14:00-15:15 Manĝotempo

15:30-17:00 Ludotempo (Juan del Castillo)

17:00-18:00

- 1) Baza kurso de Esperanto (Pedro Hernández)
- 2) Ateliero pri poezio (Jorge Camacho)
- 3) Estrarkunsido de HEF

18:00-19:00 Akvo, fonto de problemoj (Rafaela Urueña)

19:00-20:00 Ludotempo

20:15-21:30 Vespermanĝo

## Programo

**5an de julio** (sabato)

07:30-09:30 Matenmanĝo

09:30-11:00

- 1) Ĝenerala Kunsido de HEF
- 2) Libro-Servo (vizitebla dum la tuta tago)

11:00-12:00 Eklipsas (Miguel Fernández)

12:00-13:30

- 1) "Novaj tendencoj kaj servoj en la paĝaro de HEF"  
(Miguel Ángel Sancho kaj Ana Manero)
- 2) Gazetara konferenco

14:00-15:15 Manĝotempo

15:30-17:00 Ludotempo

17:00-18:00

- 1) Baza kurso de Esperanto (Pedro Hernández)
- 2) Ateliero pri poezio (Jorge Camacho)

18:00-19:00 Bécquer kaj de Diego: "Rimas" kaj "Kun sopira koro" (Antonio Valén)

19:00-20:00 Esperanto kiel klrerigobjekto de la laboristoj en la komenco de la 20a jarcento (Toño del Barrio)

20:00-21:00 Vespermanĝo

## **Programo**

**6an de julio** (dimanĉo)

07:30-09:30 Matenmanĝo

09:30-10:30 Fermo de la Kongreso

10:30-11:30 Aliro al Cigana Romancaro (Miguel Fernández)

11:30-13:30 Konatiĝo kun la urbo Kvenko

14:00-15:15 Manĝotempo

17:00-18:00 Adiaŭo

# Kelkaj Partoprenantoj kaj Partoprenoj


Ana MANERO



Naskiĝis en Madrido en 1963 kaj eklernis esperanton en 1989. Ŝi kunordigis la partoprenon de HEF en Expolingua dum pluraj jaroj kaj kunlaboris en la organizado de la Hispanaj Esperanto-Kongresoj de San Sebastián de los Reyes (2000) kaj Alcalá de Henares (2005). Delonge ŝi prizorgas la Bibliotekon Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio.

Kunlabore kun Miguel Ángel Sancho, mi prezentos la Bibliotekon Juan Régulo Pérez, ĉefe ties ret-servojn, kiel parto de la komuna programero *“Novaj tendencoj kaj servoj en la paĝaro de HEF”*.

## Miguel FERNANDEZ



Miguel Fernández naskiĝis en 1950 en Granada, kie li bakalaŭriĝis kaj ricevis kleriĝon pri solfeĝo kaj kanto-arto. En 1968 li iris al Madrido kaj ekstudis en ties Politeknika Universitato. Fernández esperantistiĝis en 1981 kaj baldaŭ komencis instrui la lingvon kaj aperigi literaturaĵojn en diversaj gazetoj el la plej renomaj en Esperantujo. Plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj en aliaj similspecaj aranĝoj, li iniciatis i.a. la Lirikajn Festojn kadre de la HEF-Kongresoj, surbaze de plurtagaj poeziaj deklamadoj, prelegoj, spektakloj k.t.p. El lia kunlaborado kun la muzikisto Pedro Vilarroig rezultis la unua kantato en esperanto, *La profil' de viaj spuroj*, por orkestro, ĥoro kaj solistoj, kiu premieris en la Muzik-Palaco de Valencia kadre de la 78<sup>a</sup> UK. Kunfondinto de la ibera grupo de e-verkistoj nuntempe konata kiel *Ibera skolo*, Miguel Fernández estas la aŭtoro de libroj kiel la poemaroj *La profil' de viaj spuroj* (kuntekste de la kvaropa poemkolekto *Ibere libere*) kaj *El miaj sonoraj soloj*, la eseoj *Sur la spuroj de Federico García Lorca*, la tradukoj *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba* (de Federico García Lorca) kaj *Poeto de l' popolo* (antologio de poemoj de Miguel Hernández) kaj kunaŭtoris la kvaropan novelaron *Ekstremoj*.

Por nia kongreso Miguel Fernández proponas du prelegojn: *Pri Cigana Romancaro*, kadre de la 80<sup>a</sup> datreveno de la



apero de la renoma poemaro de Federico García Lorca, kaj *Pri poeziaj eklipsoj kaj aliaj fenomenoj ĉe Camacho*, kie li prezentos kaj analizos la lastan poemkolekton de Jorge Camacho, *Eklipsas*.

## Lorenzo NOGUERO



Naskiĝis la 14an de julio de 1963. Esperantisto ekde 1984.

Prezidanto de "Frateco", E-societo en Aragono. Sekretario de "Fundación Esperanto" de HEF.

Altiro al Esperanto: *"mi povus diri, ke Esperanto allogis min ĉar ĝi estas bela, facila kaj aminda... kiel sindona ĉarmulino..."*

Lorenzo Noguero prelegos pri **100 jariĝo de Frateco**. En 1908 naskiĝis en Zaragozo la E-societo "Frateco". Ĝi estis unu el la plej gravaj en la hispana Esperanto-movado. Okaze de ĝia centjariĝo, oni rigardos la historion de Esperanto kaj de "Frateco".

## Jorge CAMACHO



(fotis Kike Calvo)

Naskiĝis en Zafra, Hispanujo, 1966. Paroltradukisto kaj poeto. Ĉefaj verkoj: eseoj "La liturgio de l' foiro", rakontoj en "Sur la linio" kaj "Ekstretoj", prozaĵo "La ĉapo de la sterko-vermo", novelo "La Majstro kaj Martinelli", poemoj "Celakantoj", "Saturno" kaj "Eklipsas" (ĉi lastan prezentos Miguel Fernández kadre de la kongresa programo). Tradukis "Letero el Palestino" de Santiago Alba. Ĉefredaktisto de la nova literatura revuo "Beletra Almanako", kiun li prezentos en la kongreso. Li ankaŭ gvidos poezian atelieron aŭ metiejon: interesiĝantoj kunportu siajn aŭ aliulajn poemojn, ĉu originalajn aŭ tradukitajn, ĉu definitivajn aŭ provajn; la celo ja estas interŝanĝi opiniojn, ideojn kaj spertojn.

## Antonio VALÉN



Mi naskiĝis en Soria en 1965. Loĝis ankaŭ en Zaragozo kaj nun en Vigo. Profesie mi estas lingvisto kaj instruas la hispanan kaj la francan en galega mezlernejo. Mi okupiĝas pri esperanto de 1983, kiam mi hazarde vidis hispanan-esperantan vortareton ĉe geamikoj.

Mi verkis enkondukon por la romano *Tirano Banderas* de Valle-Inclán, en traduko de Fernando de Diego, kaj prezenton al la poemaro *El la sonoraj soloj*, de Miguel Fernández. Mi estas konata ankaŭ pro miaj multaj recenzoj en diversaj e-revuoj. En la hispana mi verkis informilon *El esperanto: lengua y cultura*, kiu detale prezentas esperanton lingvistike, beletre, kulture kaj historie pere de abundaj datenoj kaj komparoj.

Mian plej oftan okupon dum multaj jaroj konsistigis la konstanta reviziado de alies tekstoj en esperanto. En 2006 mi decidis ne plu revizii ion ajn pro laciĝo kaj tempomanko. Foje mi verkis mem poemojn kaj faris beletrajn traduketojn. Sed mia ĉefa laboro estis la reviziado kaj kompletigo de la *Granda vortaro hispana-esperanta* de Fernando de Diego, kiun li finis en 1994. Jam en 1991, li petis mian helpon, kaj de tiam ni kunlaboradis kune kun Miguel Fernández, Liven Dek kaj Jorge Camacho, ĝis la eldono de la verkego en 2003.

Nun mi ŝatus eble esperantigi beletraĵon el unu el miaj

aliaj lingvoj. Iam mi promesis al mi mem traduki *Sinjinoro en ruĝo sur griza fono* de Miguel Delibes, kaj do devos iam plenumi la taskon...

En la kongreso de Kvenko mi prelegetos pri kelkaj trajtoj de la superba *Kun sopira koro*, esperantigo de la *Rimas* de Bécquer far Fernando de Diego. Mi ŝatus kompari kelkajn el la kurtaj poemoj en ambaŭ lingvoj por malkovri kaj analizi la solvojn de nia granda traduk-majstro.


### **Maria Rafaela URUEÑA**



Maria Rafaela Urueña naskiĝis en Bilbao kaj studis en Valladolid, kie ŝi doktoriĝis pri Juro en la tiea Universitato. Profesorino pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj, ŝi specialiĝis pri Juro de la Eŭropa Komunumo, estante fondinta membro de la Instituto pri Eŭropaj Studoj, kaj ankaŭ pri Marjuro kaj pri Juro de la Medio. Pri tiu lasta temo, mi gvidis "Master", kaj plurajn kursojn kaj pri tio rilatas la kongresa prelego.

La temo estas "La akvo kiel konflikto". Rilate Esperanton, ŝi esperantiĝis en la sesdekaj jaroj, kaj de 1978 ĝis 1986 estis Prezidanto de HEF. Ŝi prelegis en la IKU sesioj de la Universalaj Kongresoj, kaj dum la pasinta kongreso de la Eŭropa Unio, en Maribor (Slovenio).

## Jose Antonio DEL BARRIO



Naskiĝinta en 1961. Fizikisto. Direktoro de Fundación Esperanto.

Mi planas prelegi pri: *Esperanto kiel klerigobjekto de la laboristoj: la laborista Esperanto-movado en Hispanio en la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento.*

En pasintaj prelegoj pri historio de nia movado en antaŭaj kongresoj, ni traktis la figurojn de diversaj homoj elstaraj en nia movado. Ĉijare ni faros iom pli ĝeneralan superrigardon, en kiuj ni pritraktos kiel pri Esperanto interesiĝis unu aparta grupo de nia movado: la laboristoj. Ni vidas kiel la internacia lingvo estis unu el la fakoj kiuj kontribuis al la kleriĝo de la pli engaĝitaj kaj lernemaj homoj de tiu movado, kaj al la riĉigo de specifa kulturo kreita en tiu medio.

## Augusto CASQUERO DE LA CRUZ



Diplomita profesoro pri Ĝenerala Baza Edukado, fako Angla Filologio (Madrido, 1981). Diplomito en Logopedio, Universitato Complutense (Madrid, 1987). Licenciulo pri Filozofio kaj Sciencoj de la Edukado, branĉo Speciala Edukado, Universitato Complutense (Madrid 1985). Doktorigis, Fakultato pri Filologio, Universitato de Valencio. Titolo de profesoro de Esperanto, ILEI. Ricevis kelkajn literaturajn premiojn pro liaj verkoj en Esperanto. Ricevis premion Ada Sikorska Fighiera pro sia agado en la e-movado. Instruis hispanan lingvon kaj Esperanton en Hispanio kaj en Pollando, kaj nuntempe en Ĉinio. Nuna prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

LA CXINA DRAKO: LINGVO, KULTURO, MOVADO:  
Kiam ni parolas pri la "ĉina drako" ĉiuj scias pri kiu drako

temas. Jes, temas pri la giganto Ĉinio. Lando kiu estas en si mem mondo. Plena je kontrastoj. Lingva mozaiko. Multaj etnoj, nacioj tie kunvivadas. Mi klopodos en mallonga tempo klarigi kio kaj kia estas Ĉinio. Ni povos vidi la malnovan tradician Ĉinion, kune kun la nova, la moderna, kiu ege rapide sanĝiĝas. Scii ion pri la amaso da lingvoj tie parolataj. Koni la vivmanierojn, la nunajn kutimojn de la ĉinoj, kiuj ankoraŭ konservas siajn tradiciojn. Kaj kompreneble, mi dediĉos iomete da tempo por paroli pri la ĉina e-movado, vere unika, specifa, malsama. Ne mankos fotoj, videoj, objektoj. Kaj malgranda surprizeto.

## Kongresanoj

1	Alejandro Pareja Rodríguez	Kuenko
2	Ana Manero	Madrido
3	Manolo Parra	Madrido
4	Angel Mañero González	Madrido
5	Guadalupe Sanz Bueno	Madrido
6	Angelita Sanz Mayor	Madrido
7	Lorenzo Noguero Sarasa	Zaragoza
8	Fernando García Martínez	Albaceto
9	Itziar Arteche Urritia	Bilbao
10	Jesús Miguel García Iturrioz	Bilbao
11	Fernando Mateos Morán	Madrido
12	Eduardo Larrouy	Bilbao
13	Antje Reeh	Germanio
14	Beate Schneider	Germanio
15	María Exposito Marcos	Malago
16	Angel Robles Mata	Malago
17	José Luis Bringas Tellechea	Bilbao
18	Ángel Arquillos López	Malago
19	Maria Dolores Torres Mateos	Malago
20	María C. de Armas	Kanariaj Insuloj
21	Lionel Bonnetier (Francia)	Francio
22	Carmen Suárez Fernández-Cid	Madrido
23	Antonio Valén	Kantabrio
24	Miguel G. Adúriz	Kantabrio
25	Jorge Camacho	Madrido
26	Miguel Fernández Martín	Madrido
27	Toño del Barrio	Madrido
28	Matilde Giménez Gimeno	
29	Gilbert Stambach	Francio
30	Enrique Navarro Rubio	Zaragoza
31	Rafael Peris Solaz	Valencio
32	Fina Díez López	Kantabrio
33	Alberto Corral	Kantabrio
34	Teófilo Hernández	Kantabrio
35	Pedro Ullate López	Kantabrio
36	Ángel García Gutiérrez	Kantabrio
37	Benito González Sainz	Kantabrio
38	Rosa Santiago Mancebo	Kantabrio
39	Luis Serrano Pérez	Sabadell
40	José Roldán León	Sevilio



41	Mariló Vinuesa Salgueiro	Sevilio
42	Luis Hernández García	Valadolido
43	Rafaela Urueña	Valadolido
44	Danica Obradovič	Slovenio
45	Djordje Obradovič	Slovenio
46	Juan Antonio del Castillo Martínez	Madrido
47	Adelaida López Castro	Madrido
48	Aurea L. Vigil	Madrido
49	Maria Elvira Álvarez	Vigo
50	Maria Luisa Santamarta	Leono
51	Gregorio Sobrino Utrilla	Zaragoza
52	Augusto Casquero	Valencio
53	Pedro Hernández Úbeda	Madrido
54	Miriam Walter	Germanio
55	Jaime de Vinielles de Pereda	
56	David Redondo Rodríguez	Bilbao
57	Miguel Angel Sancho Pardo	Madrido
58	Antonio Collado Ortiz	Valencio
59	Juan Antonio Giménez García	Valencio
60	Félix Sánchez Boquete	Santiago de C.
61	Abel Montagut	Barcelono
62	Jose Ramón López Tejerina	Madrido
63	Teresa Alegre Madoz	
64	Felipe Val González	
65	Juan Antonio Torres Galán	Seviljo
66	José Añó Belda	Valencio
67	Wolfgang Guenther	Alikanto
68	Charlotte Beller-Guenther	Alikanto
69	Alicia Ballester Torregrosa	Valencio
70	Miguel Bernabeu Egea	Alikanto
71	Sol Roca	Taragono
72	Francesc Inglada	Taragono
73	Rodrigo Portela Sánchez	Valadolido
74	Jordi Liétor López	Jaeno
75	Jesús Garcia Alcántara	Jaeno
76	Isabel Monreal Fernández	Pamplono
77	Eduardo Berdor	Zaragoza
78	Raúl Martínez Anguita	Ciudad Real



# Beletra Almanako

N-ro 2 (Marto 2008)

ISBN 978-1-59569-087-6 / ISSN 1937-3325

Redaktas Jorge Camacho (ĉefred.), Probal Daŝgupto, István Ertl

Fotoj:  
Nuria kaj  
Enrique Cano



Ĉi-numere:

- Poezio** ... *Originala:* Benoît Philippe, Baldur Ragnarsson. *Tradukita:* Changyno (Mao Zifu), Walt Whitman (*Maurice Wittenberg*), Memore al Rejna de Jong kaj Claude Piron
- Prozo** ... *Originala:* Filipo Dorcas, Carmel Mallia, Alejandro Cossavella, Reinaldo Marcelo Ferreira. *Tradukita:* Grigorij Kanoviĉ (*Tomasz Chmielek*)
- Teatro** ... *Originala:* Paul Gubbins. *Belartaj Konkursoj 2007:* Stefan MacGill
- Eseoj** ... Humphrey Tonkin, Trevor Steele, Paul Gubbins
- Recenzoj** ... Carlo Minnaja, Gonçalo Neves, Jorge Camacho kaj Christian Declerck

**MONDIAL NOVJORKO**

[www.librejo.com](http://www.librejo.com)

# Beletra Almanako

ISSN: 1937-3325

Inter 140 kaj 176 paĝoj,  
grando pr. 21 x 13,5 cm

Prezo  
(inkl. sendokostoj):

unuopa kajero  
(al Hispanio): € 13,00

jarabono (3 numeroj)  
en 2009 (al Hispanio):  
€ 33,00

Por pliaj informoj:  
[www.librejo.com](http://www.librejo.com)

**Beletra Almanako (BA)** estas nova literatura periodaĵo kun inter 140 kaj 176 paĝoj. Jam aperis BA1 (sept. 2007) kaj BA2 (marto 2008), kaj en septembro 2008 aperos la tria numero. En 2009 BA aperos trifoje.

**BA estas redaktata** de Jorge Camacho (ĉefredaktoro), Probal Daŝgupto kaj István Ertl. Ĝin eldonas Ulrich Becker (Mondial, Novjorko).

**BA enhavas diversajn rubrikojn**, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuoj, leteroj, debato ktp, originale kaj traduke. Laŭ inter-konsento kun UEA, ankaŭ la verkoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj aperas en BA. Aperas en BA materialo speciale verkita por ĝi, sed ankaŭ altkvalitaj tekstoj jam pli frue aperintaj en la reto sed ne surpapere. Ni invitas vin proponi aŭ anonci materialon, propran aŭ aliulan. Ankaŭ ilustristoj (desegnistoj, fotistoj) bonvenas.

**Al la ĝisnunaj BA-aŭtoroj apartenas** i.a.: Mauro Nervi, Mao Zifu, Baldur Ragnarsson, Jorge Camacho, Alejandro Cossavella, Reinaldo Marcelo Ferreira, Gonçalo Neves, Benoît Philippe, Humphrey Tonkin, Rejna de Jong, Claude Piron, Trevor Steele, Paul Gubbins, Luiza Carol, István Ertl, Carlo Minnaja, Dimitrije Janičić, Edwin de Kock, Christian Declerck, Valentin Melnikov, Carmel Mallia ...